

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Majo / Junio / Julio 1974



Brila IFEF-kongreso en Hispanio



La urboj Tarragona kaj Villanueva y Geltrù honore al la kongreso speciale salutis
per „homturoj“

Inter la 10a kaj 17a de Majo 1974 kongresis en Tarragona/Hispanio 648 fervojistoj kaj familianoj el 17 landoj. Kiel unusola lingvo servis por la fakaj, kulturaj kaj distraj programoj la Inter-

nacia Lingvo Esperanto. La 26a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) staris denove sub la aŭspicio de la Internacia Arta kaj Kultura Fervojista Federacio (FISAIC).

La hispanaj fervojoj (RENFE) demonstris sian kavaleran ĝentilecon disponigante en la hispana limstacio Port Bou specialan trajnon „Esperanto-Ekspreso“, kiu transportis la kongresanojn direkte ĝis Tarragona. Jam atendis aŭtobusoj, ĉar kongresejo kaj restdejo troviĝis kelkajn kilometrojn for de la urbocentro. Tie, en granda parko, situis la multe laŭditaj feriaj dometoj. Tamen antaŭ ol ricevi la sopiritan ŝlosilon necesis longtempaj proceduroj ĉe la diversaj kongresaj ĝiĉetoj. Sed la idilia loĝigo valoris la paciencon atendadon. Trankvilo kaj florodoro, bonkvalitaj manĝaĵoj en proksima salonego kaj mallongaj distancoj al la kongresejo estis kelkaj el la avantaĝoj ne parolinde pri la favora prezo. Proksime allogis la blua mediteranea maro, ankoraŭ ne tro varma.

Sub la brila printempa, ofte jam somera suno okazis la tiujara kongreso de IFEFF, kiu plene sukcesis kaj bonege plaĉis al la partoprenintoj. Tiuj, kiuj ne povis veni, sendube bedaŭras sian foreston. Loka Kongresa Komitato estis surprinita amason da preparlaboroj por gajni la interesecon kaj subtenon de diversaj aŭtoritatuloj. Ĉio tio, kelkfoje eĉ sub la premo de improvizado aŭ malfruo, kondukis al ĝojigaj rezultoj. La kongresanoj alkitimiĝis al la hispana vivomaniero relative baldaŭ, precipe al la aliaj tempoj vespere. Ke ekzemple la interkona vespero iom suferis por la neeblo esti kune en la sama salonego, ne troe gravas; sed la estontaj LKK direktu sian atenton ankaŭ al la unua vespero de la kongreso.

La sekva dimanĉo (12.5.) komenciĝis per digna ekumena diservo en la plenplena preĝejo situanta meze en la parko. En la teretaĝo de la kongresejo kolektiĝis poste la kongresanaro por komune ĉeesti la solenan malfermon. Jam komence de tiu solena kunveno kaj denove inter la oficialaj paroladoj plezurigis okulojn kaj orelojn junaj studentoj, folklore vestitaj; ili muzikis kaj kantis kun verve kaj ĉarmo.

LKK-prezidanto R. Gimenez povis bonvenigi membrojn de la honora patrona komitato kaj aliajn aŭtoritatulojn. Saluti la kongreson oficiale la urbestro s-ro Ricardo Vilar Guix, s-ro Lopez, sekretario de la provinca estraro, kololenlo Murillo,

reprezentanto de la milita provincestro. Aparte afablajn vortojn esprimis la delegito de la sindikato, s-ro Copeda. Nome de la ĝenerala direkcio de RENFE salutis s-ro Josè M. Fortuny, direktoro de la kvina distrikto en Barcelono. Post tiuj alparoloj en hispana lingvo salutis la kongreson en perfekta Esperanto kaj en vere amika senco s-ro J. Gilles, nome de FISAIC.



La reprezentanto de FISAIC (Internacia Federacio de kulturfliegantaj fervojistoj), s-ro Georges Gilles, Belgio (maldekstre), en amika kontakto kun la prezidanto de IFEFF.

Plie salutis la kongreson s-ro A. Figuerola, prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, kaj nome de UEA s-ro R. Molera. Sekvis la emocia transdono de salutoj flanke de partoprenantoj el 17 landoj, de homoj kun 12 diversaj gepatraj lingvoj. Por GEFA salutis sprite s-ro W. Grass. IFEFF-prezidanto J. Giessner malfermis la kongreson por enhavoriĉa parolado dankante al la honoraj gastoj kaj al LKK.

Li skizis la perspektivojn de la Internacia Lingvo kaj pledis por nepra daŭrigo sur neŭtrala vojo.

Dum la sekva komuna fotografado oni havis preskaŭ la impreson, ke la nombro de la foto- kaj filmamatoroj estis pli granda ol tiu de la ceteraj kongresanoj, kiuj paciencie plenigis li ŝtuparon.

La urba rondvturado suferis por denova pluvo kaj mankaj informoj pri la belegaj vidindaĵoj. Ankoraŭ pluvis, kiam la aŭtobusoj atingis la urbeton San Pau de Ordal, kie la nova Esperanto-muzeo de malavara farmacisto estas inaŭgurita. En la korto de la lernejo la komunumo regalis nin per trinkaĵoj.

Spite al tiu tro longdaŭra ekskurso la dimanĉo ankoraŭ ne estis finita. Antaŭ la lumigita urbodomo, kiu formis kun la ĉirkaŭaj loĝigitaj domoj eksterordinare belan kulison, la urbo dediĉis al la kongresanaro kaj al centoj da aliaj spektantoj grandiozan folkloran vesperon. Ankoraŭ sonas en miaj oreloj la melodioj, laŭ kiuj dancis bele vestitaj paroj. Diabolo kun lumaj okuloj turmentis la furiozan klakadon de vira dancgrupo. Junaj gimnastikistoj vekis admiron, sed la plej grandan aplaudon rikoltis junaj atletaj viroj, kiuj formis homajn piramidojn ĝis ses etaĝoj, dume klarnetoj kaj tamburoj akompanis tiun streĉan sporton. (Vidu frontpaĝan bildon.) La lundo (13.5.) estas dediĉita al la laboro almenaŭ por la estraro kaj komitato de IFEF, kiuj devis pritrakti multnombrajn federaciajn problemojn. Subbaze de la nova statuto kaj per la harmonia kunlaboro inter ekzekutivo kaj legislativo la laborkunvenoj bone pasis. Bedaŭrinde ili ne trovis la kutiman atenton flanke de la aliaj kongresanoj, kio pro la bona vetero ankoraŭ ne estis mirinda.

Kolego J.Cerzo prezentis en sia posttagmeza fakpreleĝo la evoluon de RENFE dum la lasta jardeko. Fakte estas konstateblaj multnombraj plibonigoj de la sanĝoj en Barcelono, kie la trakoj jam tri, oviĝas parte sub la tero. Kvanto kaj kvalito de la hispanaj transportiloj atingis vastan agnoskon.

La vespero estas kronumita per bankedo en la ĉarma restoracio „Las Palmeras“ kun marvida teraso. Frandaĵoj el la hispana kuirejo kaj kelo surtabliĝis, muziko bruidis por la sekva balo, kaj bonhumoro regis. Oni ĝojis precipe pri la elegante vestitaj damoj. En tiu festa kadro s-ro J. Gilles transdonis kun laŭdaj vortoj oran medalon de FISAIC al s-ro O. Walder (Svislando) por honorigi liajn servojn en

la IFEF-estraro. Por multaj la internacia balo, parte subĉiela sub palmoj, finĝis je la dua ankoraŭ tro frue.

La mardo (14.5.) alportis laborkunsidojn de la Terminara kaj Junulara Komisionoj, pri kiuj la „Internacia Fervojisto“ detale raportos. Posttagmeze denove aŭtobusa karavano startis kaj atingis la bele situantan marburbon Sitges. Ankoraŭ ne regis la turista vivo de la baldaŭa sezono, sed la somera vetero stimulis multajn ĝui la promenadon sub palmoj aŭ la glaciaĵon en unu el la multnombraj restracioj. Tiu ekskurso havis ankaŭ fakan karakteron. En Villanueva y Goltu estas vizitita ekspozicio de malnovaj lokomotivoj kaj vagonoj. Regalo per vino, hompiramidoj, akcepto per la urbestro kaj vizito al proksima muzeo kompletigis tiun agrablan ekskurson.

Specialan ĝuon ofertis la Bulgara Teatro Sofia vespere prezentante la triaktan komedion „La rozoj“ de Aldo de Benedetti. Unu spriteco sekvis la alian en senmakula Esperanto. Veraj artistoj regis perfekte siajn rolojn. La tondra aplaŭdo estis merita.



Gaja rondo kun la 3 bulgaraj aktoroj, kiuj tiom agrable amuzis kaj ĝojigis la kongresanojn. Antaŭa vico de maldekstre: unua s-ro M.Cobanov, dua s-ino B.Beleva kaj kvara s-ro A.Anev.

Merkkredon (15.5.) okazis la plenkunsido, kiu pritraktis multnombrajn aferojn de IFEF. La ekziĝo de du estraranoj (redaktoro kaj kasisto) necesigis la elekton de posteuloj. Elektiĝis ankaŭ novaj kasrevizoroj kaj sekretarioj por diversaj komisionoj krome gvidantino de la Junulara Sekcio. Ne estas ĉi tie la loko por detale raportoj, sed sub la lerta gvidado de la IFEF-prezidanto J. Giessner kaj de la ĉefkomitatano K. Greutert la plenkunsido okazis laŭplane kaj korekte. Kiel kongresloko por 1975 (10. – 17. 5.) elektiĝis Villach/Aŭstrio, kaj por 1976 estas antaŭvidita la

ĝis nun nekonata Skelleftea en Svedio. Ankaŭ tiu posttagmezo allogis per aŭtobusekskurso, tion fojon suden al la mar-urbo Peñiskola, eble komparebla kun San Marino/Italio. Jen urbeto sur rokoj kun romantikaj stratetoj, helaj domoj, floroj, suvenirbutikoj, giganta fortikaĵoj, dikaj muroj, interne malvarmaj haloj

Ĉie turistoj kaj super ĉio brila ĉielo.

La kongreso iom post iom proksimiĝis al sia kulmino. Jaŭdon (16.5) la vicurbestro de Tarragona invitis la deleditojn al la sama salonego en urba domo, kie 13 jarojn antaŭe, estis okazinta simila akcepto. Denove interŝanĝo de afablaj vortoj kaj reciprokaj donacoj, sed imponis la sincereco de la vicprezidanto, kiu konfesis la valoron de nia Internacia Lingvo.

Posttagmeze disvolviĝis la junulara agado. Okazis la jam tradicia futbalmatĉo inter esperantista kaj loka taĉmento, kiun tradicie perdis la esperantistoj. Pikniko sekvis ludojn, skeĉoj ĝojigis la junularon, kiu finis la vesperon per propra balo. LIFKAU-anoj amuzis sin en aparta frenezserĉaŝerca kunveno.

La lasta tago, vendredo (17. 5.) staris sub la signo de tuttaga ekskurso, denove per aŭtobusoj. La unua celo estis la urbo San Sadurni, fama pro ĝia ĉampanfabriko „Codorniu“. La kongresanoj vizitis la modernajn instalaĵojn, kiuj funkcias parte aŭtomate. Ĉie estis konstanteblaj modernaj produktometodoj racie elpensitaj. Ni vidis la vojon de la malplenaĵ boteloj ĝis la deponigo de la plenaĵ boteloj. Ni rigardis kelkajn keloetaĝojn plenaĵ de ĉampanboteloj, kaj ĉe la eliro ĉiu ricevis botelon de ŝaŭmvino.

La aŭtobusoj daŭrigis sian veturadon sur kurboriĉaj stratoj al la mondfama monaĥejo Montserrat, kiu situas deponst jarcentoj enmeze de deklivaj rokoj. La grandskalaj konstruaĵoj postlasas imponan impreson, spite al la amaso de turistoj, kiun transportas supren unu aŭtobuso post la alia. Al multaj plaĉis la belegaj kantoj de ĥoro en la malluma katedralo kun ĝia

konata Maria-skulpturo. Aliaj rigardis la trezorojn de la muzeo: La turista alfluo ne volis ĉesi.

En la urbo Valls atendis la kongresanojn granda restoracio. Estas apenaŭ eble priskribi la unuopaj sinsekvojn de la tipaj manĝaĵoj. La kelneroj alportis duone bruligitajn legomojn, kiujn manĝi oni ne povis sen malpurigi manojn kaj vizaĝojn, ĉar forkoj aŭ kuleroj ne ĉeestis laŭ regiona kutimo. La trinkkapablaj personoj direktis la maldikan vinradion el strange formitaj boteloj en siajn buŝojn. Gajeco kaj kantemo kreskis, ĝis kiam finfine la aŭtobusoj transportis la iom sentimentalan lacajn batalantojn reen al Tarragona.

Lastan fojon oni kolektiĝis en la kongresejo por aŭdi la ferman raporton de la IFEF-prezidanto. Ĉiuj dankeme aplaudis al la fervoraj malmultaj LKK-anoj, kiuj kapablis aranĝi tiel neforgeseblan kongreson sub mediteranea suno. La kongresa flago iris en la manojn de la aŭstra kolego. Tiuj, kiuj ne revidis sin la sekvan sabaton por partopreni la postkongreson, adiaŭis kun emocio kaj danko por la belegaj tagoj. Ĝis revido venontjare en Aŭstrio!

W. B.



Senĝena akcepto de la urbestro de Villanueva y Geltrú inter lokomotivoj kaj reĵoj. LKK transdonis medalon kun kapo de d-ro Zamenhof. De maldekstre: prez. LKK Gimenez, IFEF-prez. Gießner, Urbestro

GEFA-Jahresversammlung in Bamberg

Dem BULTENO liegen das vorläufige Programm mit abtrennbarer Anmeldung und die Zimmerbestellkarte bei, die ausgefüllt bis zum 15.9.1974 an das Verkehrsamt der Stadt Bamberg zurückgesandt werden

muß. Das Verkehrsamt sendet jedem Besteller eine Reservierungsbestätigung mit Unterkunftsanschrift.

Wir laden unsere Mitglieder mit Angehörigen und Bekannten und unsere ausländischen Freunde herzlich ein.

Evтуado de RENFE dum la lasta jardeko

Resumo de fakprelego prezentita dum la 26a IFEF-kongreso Majo '74 en Tarragona (Hispanio).

1 Fervojlinoj

Kiam postmilitite en 1941 estis kreita la Fervoja Nacia Hispana Reto (RENFE) ĝiaj linioj ampleksis 12 778 km, kun larĝa ŝpuro de 1676 mm. En la jaro 1963 stariĝis la Dekjara Projekto por Modernigo (DPM) 1963 – 1972, kiu i. a. ĉesigis pli ol mil kilometroj da neprofidonaj relvojoj. La nun ekspluatata reto ampleksas 13 523 km.

2 Renovigo kaj modernigado

La moderniga plano DPM precipe celis la ĉefajn liniojn por plialtigi tie la komercan rapidecon kaj redukti la kostojn por trakkonservado kaj veturilriparo. Oni modernigis pli ol 5mil kilometrojn de trakoj, kio forprenis 30% el la financaj rimedoj por la plano. Por atingi, ke la meza aĝo de trako ne superu 20 jarojn, oni devos ĝis 1987 renovigi ĉiujare 500 km.

3 La cirkulanta materialo

25 % el la financaj rimedoj por DPM estas destinitaj por pligrandigi la nombron de disponeblaj sidlokoj en komfortaj pasaĝervagonoj, kaj larĝa gamo da specialaj varvagonoj estis akirita. Elektrotrajnoj kaj dizelaj motortrajnoj kompletigas la oferton de la konvencaj trajnoj. La tria klaso de pasaĝervagonoj estas ĉesigitaj, ĉirkaŭ mil lignaj vagonoj eksigitaj kaj anstataŭigitaj. La maksimume permesebla aĝo estonte estu por pasaĝervagonoj 35 jaroj, por elektrotrajnoj 30 jaroj kaj por dizelaj motortrajnoj 25 jaroj.

4 Pasaĝeroj

Proporcio kun la pliboniĝo de la nacia ekonomia stato ankaŭ kreskis dum la jardeko la nombro de transportitaj pasaĝeroj je 15 milionoj kaj tri miliardo da pasaĝerkilometroj. La enspezoj el la pasaĝertrafiko kreskis je 5 miliardoj da pesetoj, ĝi duobliĝis.

5 Varoj

La vartrafiko antaŭe stagnanta pliiĝis en la jardeko je 5 milionoj de netaj tunoj kaj 1,8 miliardoj da tunkilometroj.

Die Entwicklung der Spanischen Eisenbahnen im letzten Jahrzehnt

Resümee eines Fachvortrages, vorgetragen im Rahmen des 26. internationalen Kongresses der Eisenbahner-Esperantisten im Mai 1974 in Tarragona (Spanien).

1 Bahnstrecken

Als 1941 nach dem Bürgerkrieg das Nationale Spanische Eisenbahnnetz (RENFE) geschaffen wurde, umfaßte es 12 778 km, mit Breispur von 1676 mm. Im Jahre 1963 wurde ein „Zehnjahresplan zur Modernisierung 1963 – 1972“ aufgestellt, der u. a. über 1 000 km unrentabler Strecken stilllegte. Das jetzt betriebene Streckennetz umfaßt 13 523 km.

2 Erneuerung und Modernisierung

Der Modernisierungsplan bezog sich auf die wichtigsten Strecken, um dort eine höhere Reisegeschwindigkeit zu erzielen und die Kosten für Gleisunterhaltung und Fahrzeugreparaturen zu senken. Mehr als 5 000 Streckenkilometer wurden modernisiert, was 30 % der Finanzmittel des Planes verschlang. Damit in Zukunft das mittlere Alter eines Gleises 20 Jahre nicht übersteigt, wird man bis 1987 alljährlich 500 km erneuern müssen.

3 Rollendes Material

25 % der Finanzmittel des Planes waren dazu bestimmt, das Sitzplatzangebot in komfortablen Reisezugwagen zu vergrößern; daneben wurde eine breite Skala von Spezialgüterwagen beschafft. Elektrische Triebzüge und Dieseltriebzüge ergänzen das Angebot der konventionellen Züge. Die dritte Klasse bei Reisezugwagen wurde abgeschafft, etwa 1 000 Wagen der Holzbauart wurden ausgemustert und ersetzt. Das höchste zulässige Alter soll künftig bei Reisezugwagen 35 Jahre betragen, bei Elektrotriebzügen 30 Jahre und bei Dieseltriebzügen 25 Jahre.

4 Reisende

Hand in Hand mit der Verbesserung der volkswirtschaftlichen Verhältnisse nahm die Zahl der beförderten Reisenden in diesem Jahrzehnt um 15 Mio zu, die Personenkilometer um 3 Milliarden. Die Einnahmen aus dem Reisezugverkehr stiegen um 5 Milliarden Peseten, womit sie sich verdoppelten.

5 Güter

Der Güterverkehr, der bis dahin stagnierte, nahm in diesem Jahrzehnt um 3 Mio Nettotonnen zu, die erbrachten

Eĉ pli kreskis la enspezoj je 2,75 miliardoj da pesetoj sekve de trafplialtiĝoj.

6 Special transportoj

La unua kontenera trajno (TECO) trafikis 1972 inter Madrido kaj Barcelona, en 1973 oni jam transportis pli ol 30 mil kontenerojn kun neta pezo de 300 mil tunoj kaj 200 milionojn da tunkilometroj.

7 Trakcia materialo

La perkarba vaportrakcio grandskale malaperis dum la jardeko. RENFE akiris 90 elektrajn lokomotivojn, 112 elektrotrajnojn, 270 dizelajn linio-lokomotivojn, 215 dizelajn manovro-lokomotivojn, 19 TALGO-trajnojn, 33 TER-trajnojn kaj 125 relaŭtobusojn.

8 Fiksaj instalaĵoj

Elstaris dum la jardeko la inaŭguro de la nova stacio Chamartin ĉe Madrido, la konstruado de pluraj stacioj, laŭlonge de la nova relvojo Burgos – Madrido, kaj la renovigo de multaj centraj stacioj. Pri stacioj por vartrajnoj estas menciinda la inaŭguro de manovrejo Vicalvaro.

Sur la sektoro signaliloj kaj telekomunikado oni faris preparojn por centrigita trafikontrolo, instalante komunikilojn por alta frekvenco kaj centrigita selektilo, precipe je la linioj Tarragona – Tortosa kaj Valencia – Sagunto. Koncerne neprofitdonaĵajn liniojn oni celas fermi kaj malinstali grandan nombron da linioj kun negativa bilanco.

Domkonstruaĵoj: Krom stacidomoj, konstruaĵoj por trakkonservado kaj kun socia karaktero estas rimarkinda la inaŭguro de nova oficejdomo kaj al akiro de alia oficejdomo, ambaŭ en Madrido. Ankaŭ centra riparejo estis konstruita.

9 Elektroniko

La enkonduko de elektronika biletvendo en 1968, komence nur por trajnoj ek de Madrido, servas al rapidmoveco kaj modernigo de la vendosistemo: La biletojn inkluzive rezervadon de sidloko oni jam du monatojn antaŭe povas akiri. Intertempe la servo etendiĝis al preskaŭ ĉiuj trajnoj kaj ĝi funkcias same ĉe RENFE-oficejoj kaj vojaĝagentejoj. Du pliaj komputeroj ebligis inkluzivigi i. a. la kombinon

Tonnenkilometer um 1,8 Milliarden. Die Einnahmen stiegen infolge von Tarifierhöhungen noch stärker an, nämlich um 2,75 Milliarden Peseten.

6 Besondere Transporte

Der erste Containerzug (TECO) verkehrte 1972 zwischen Madrid und Barcelona, 1973 wurden bereits 30 Mio Container mit einem Nettogewicht von 300 Mio Tonnen und 200 Mio Tonnenkilometer befördert.

7 Triebfahrzeuge

Der Dampfzugbetrieb mit Kohlen verschwand in diesem Jahrzehnt weitgehend. RENFE beschaffte 90 Elektrolokomotiven, 112 Elektrotriebzüge, 270 Dieselloks für Streckenbetrieb, 215 Dieselangierloks, 19 TALGO-Züge, 33 TER-Züge und 125 Schienenbusse.

8 Bauliche Anlagen

Besonders hervorzuheben ist in diesem Jahrzehnt die Einweihung des neuen Bahnhofs Chamartin bei Madrid, der Bau mehrerer Bahnhöfe entlang der Neubaustrecke Burgos–Madrid und die Erneuerung zahlreicher Knotenbahnhöfe. Bei den Güterbahnhöfen ist die Einweihung des neuen Rangierbahnhofs Vicalvaro zu erwähnen.

Auf dem Gebiet der Signal- und Fernmeldeanlagen wurden Vorbereitungen für die Streckenfernsteuerung getroffen und hochleistungsfähige Leitungen mit Konzentratoren installiert, insbesondere auf den Strecken Tarragona – Tortosa und Valencia – Sagunto. Bezüglich unrentabler Strecken ist Schließung und Rückbau einer großen Anzahl von Strecken mit negativer Bilanz vorgesehen.

Hochbauten: Neben Empfangsgebäuden, Bauten für den Unterhaltungsdienst und solchen mit sozialem Charakter sind die Einweihung eines neuen Bürohauses und der Ankauf eines weiteren Bürohauses, beide in Madrid, erwähnenswert.

9 Elektronik

Die Einführung der elektronischen Fahrkartenschreibung 1968, zunächst nur für Züge ab Madrid, dient der Beweglichkeit und Modernisierung des Verkaufssystems: Fahrausweise einschließlich Sitzplatzreservierung kann man schon zwei Monate im voraus erwerben. Inzwischen wurde das Verfahren auf nahezu alle Züge ausgedehnt, es wird bei RENFE-Fahrkartenausgaben und bei Reisebüros praktiziert.

de litvagona bileto kun la vojaĝbileto en unu bileton, kaj la kontrolon de la pasaĝervagona stoko. La enkonduko de plej moderna sekurecistemo „centra trafikontrolo“ (CTC) estas en preparo respektive jam parte okazis sur kelkaj linioj.

- 10 **Organizado pri kontoj kaj administracio**
Sekvante la kreskantaj bezonojn oni kreis por asignitaj taskoj novajn departementojn, kunfandis aliajn kaj formulis strategian planon pri la organizado.

11 **La projekto RENFE 1972 – 1975**

Ne temas pri simpla daŭrigo de la DPM, tio estas nur eta parto. Precipe ĝi antaŭvidas projekti estontecan fervojon je plej altaj rapidecoj kaj la aplikon de cibernetiko al transportproblemoj en grandaj urboj kaj por specialaj vartransportoj.

12 **La homo en RENFE**

Laŭ la strategia plano RENFE faros diversajn agadojn por disponigi familian helpon kontraŭ riskoj kaj malagrablaĵoj ne inkluditaj aŭ ne sufiĉe konsideritaj de la socia asekuro. Krome oni esploras la enkondukon de kombinita sistemo pri bazaj salajroj kaj stimulpagoj laŭ la evoluado de la vivkosto. Fine oni cedos kreditojn al fervojistoj. Por akiri loĝejojn, kaj samtempe RENFE mem konstruas familiajn loĝejojn.

13 **Profesia klerigado**

Oni konsideras ĉiujn kategoriojn de fervojretaj laborantoj kaj ankaŭ novajn aŭ konvertendajn fervojistojn, planas la necesajn instalaĵojn. Plie oni favoros kulturalan klerigon de la laboristoj kaj iliaj familiaj per esceptaj helpoj.

14 **La financa situacio**

RENFE en 1970 unuafoje atingis pozitivan ekspluatbilancon kaj oni esperas en proksima estonteco atingi memfinancadon. RENFE prenis trifoje krediton ĉe la Internacia Banko pri Rekonstruado kaj Progresigo (IBRD) pri entute pli ol 200 milionoj da usonaj dolaroj, la ŝtato donis la necesan garantian.

Zwei weitere Recheneinheiten ermöglichen u. a. die Einbeziehung der Ausgabe von Bettkarten und Fahrausweis in einem Beförderungspapier sowie die Überwachung des gesamten Reisezugwagenseinsatzes. Die Einführung einer modernen Streckenfernsteuerung (CTC) ist in Vorbereitung bzw. wurde auf einigen Strecken bereits realisiert.

10 **Organisation des Rechnungswesens und der Verwaltung**

Den ständig wachsenden Bedürfnissen entsprechend wurden neue Abteilungen mit abgegrenzten Aufgabenbereichen geschaffen, andere zusammengefaßt und ein strategischer Organisationsplan erstellt.

11 **Die Planung RENFE 1972 – 1975**

Es handelt sich nicht um eine einfache Fortsetzung des Zehnjahresplans, dies ist nur ein kleiner Teilbereich. In erster Linie projiziert man die Eisenbahn der Zukunft mit höchsten Geschwindigkeiten und die Anwendung der Kybernetik für die Transportprobleme der Großstädte sowie für besondere Transporte.

12 **Der Mensch bei RENFE**

Nach dem strategischen Organisationsplan wird RENFE verschiedene Schritte unternehmen, um Familienhilfe gegen die Risiken und Wechselfälle des Lebens zu bieten, die nicht oder nur unzureichend von der Sozialversicherung abgedeckt werden. Außerdem läuft eine Untersuchung für die Einführung eines kombinierten Systems von Grundlöhnen und Prämien entsprechend der Entwicklung der Lebenshaltungskosten. Schließlich will man den Eisenbahnern Kredite zur Wohnungsbeschaffung einräumen und gleichzeitig wird RENFE selbst Wohnungen für Familien bauen.

13 **Berufliche Bildung**

Diese soll sich auf alle Kategorien von Mitarbeitern erstrecken und auch neue und umzuschulende Eisenbahner einschließen; die erforderlichen Einrichtungen werden gefordert. Darüber hinaus will man die kulturelle Weiterbildung der Mitarbeiter und ihrer Familien durch Hilfe im Einzelfall unterstützen.

14 **Die finanzielle Situation**

RENFE erreichte 1970 erstmals eine positive Betriebsbilanz, und man hofft in naher Zukunft die Eigenfinanzierung zu erreichen. Dreimal hat RENFE Kredit bei der Internationalen Bank für Wiederaufbau und Entwicklung (IBRD) von insgesamt mehr als 200 Mio US-Dollar aufgenommen, wobei der Staat die notwendige Garantie leistete.

Kongreßresolution

Der 26. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF), der mit 648 Teilnehmern aus 17 Ländern in Tarragona (Spanien) stattgefunden hat,

- stellt fest, daß sich die Auseinandersetzungen auf sprachlichem Gebiet laufend verschärfen und daß einige Mächte in zunehmendem Maße ihre sprachlichen Einflußzonen vergrößern,
- stellt weiter fest, daß solche Methoden zur sprachlichen Diskriminierung zahlreicher Völker und Minderheiten führen, was der Erklärung der Menschenrechte widerspricht,
- weist darauf hin, daß bei den Eisenbahnverwaltungen die gleiche Diskriminierung anzutreffen ist, z. B. in allen Konferenzen, Symposien, technischen Zusammenkünften, aber auch in den internationalen Reglements, weil überall nur eine oder wenige Arbeitssprachen gebraucht werden,
- empfiehlt, sich schnellstens darum zu bemühen, daß mittels einer geeigneten neutralen Sprache diese Diskriminierung bei den Eisenbahnen und Gewerkschaften, die beide als fortschrittlich bekannt sind, künftig vermieden wird,
- schlägt vor, hierfür die praktisch erprobte internationale Sprache Esperanto zu verwenden,
- bittet die Eisenbahnverwaltungen und Eisenbahner-Gewerkschaften, sobald wie möglich eine internationale Konferenz einzuberufen, um diesen nicht mehr zumutbaren Zustand im Interesse der Eisenbahnen, der Reisenden und der Eisenbahner zu ändern.

Provizora programo de la 18a GEFA-jarkunveno en Bamberg 11a ĝis 13a de Oktobro 1974

Akceptejo en la halo de la stacidomo, apude de la fervoja policejo

Kunsidoj, festvespero kaj matineo en „Harmonie“-salonegoj Schiller-Placo 7, meze en la urbo

Kontakt-kunveno en babila rondo sen programo en tipa bamberga restoracio „Weierich“ en malnova urbparto

11a de Oktobro

10.00 Gazetara konferenco kaj malfermo de la ekspozicio „Stratoj al la mondo“

12.00 Akceptejo malfermata

19.00 GEFA-estrarkunveno

19.00 Babila rondo sen programo en hotel-restoracio „Weierich“

12a de Oktobro

8.00 Akceptejo malfermata

9.00 Gvidata rondirado tra la malnova parto

9.00 Lingva ekzameno, skriba parto

9.00 Laborkunsido de la GEFA-estraro kaj distriktkomisiitoj (nepublika)

12.00 Komuna tagmanĝo en „Theaterrose“, parto de la „Marmoniesäle“

14.00 Aŭtobusa-ekskurso al la kastelo „Pommersfelden“ kaj eksmonŝejo „Ebrach“

19.30 Festvespero kun dancado kaj varia programo

13a de Oktobro

9.00 Lingva ekzameno, buŝa parto (publika)

9.30 Matineo — jarraporto de la GEFA-prezidantno, film prezentado kaj folkloraj prezentadoj

12.30 Komuna tagmanĝo

Niajn eksterlandajn geamikojn ni kore invitas partopreni nian semajnfinan jarkunvenon en la vizitida 1000-jaraĝa, nordbavara urbo Bamberg (proksime de Nürnberg). Petu aliĝilon kaj detalan programon ĉe la GEFA-sekretariino Elfriede Kruse, D-6 Frankfurt/Main, 74, Wiener Straße 121 (nova adreso).

Eisenbahntreffen in Hamburg

Vom 27. Juli bis 2. August 1974 findet in Hamburg der 59. Esperanto-Weltkongreß statt. Es ist schon Tradition geworden, daß die im Kongreß anwesenden Eisenbahner sich in einer Zusammenkunft treffen. Dieses Treffen soll am Dienstag, dem 30. Juli stattfinden.

Das Programm wird nachstehend veröffentlicht:

8.30 ab Kongreßgebäude am Bahnhof Hamburg-Dammtor, Fahrt mit der S-Bahn nach Hamburg-Altona

9.00 Zusammenkunft im Sitzungssaal der Bundesbahndirektion Hamburg, die gegenüber dem Bahnhof Hamburg-Altona liegt.

Empfang durch den Präsidenten der Bundesbahndirektion, Fachvortrag „Was sie noch nicht wußten — von der Bahn“, anschließend Busfahrt zu einem schön gelegenen Restaurant an der Elbe, dort gemeinsames Essen.

13.30 Fahrt mit Barkasse durch das Hafengebiet, Besuch einiger sehr interessanter Punkte (Übersee-Container-Terminal, neu erbaute Köhlbrand-

Hochbrücke und Kattwyk-Hubbrücke
Rückkehr gegen 17 Uhr.

Preis des Ausflugs einschl. Essen
13 DM.

Die Coupons für den Ausflug sind am
**offiziellen Schalter der DB im Kongreß-
gebäude** erhältlich, wo während des Kon-
gresses (nicht am 1.8.) Mitglieder von
GEFA Dienst tun. Dort sind die Eisenbahn
betreffende Auskünfte, Fahrkarten, Platz-,

Bett- und Liegekarten zu erhalten.

Bitte melden Sie sich nach Ihrer Ankunft
an diesem Schalter, auch wenn Sie nur
kurzfristig in Hamburg sein sollten.

Die Teilnehmerzahl ist begrenzt. Deshalb
ist vorherige Anmeldung bei Werner Lepke,
Bundesbahndirektion Hamburg, 2 Hamburg
50, Am Felde oder spätestens am DB-
Schalter im Kongreßgebäude erforderlich.
GEFA-Sekretariat

Nekrologoj

Ni perdis tute neaten-
dite nian estimatan sa-
midianon kaj amikon

Richard König
en Weiden (Oberpfalz)
la 26an de aprilo 1974
ĝuste je la 66a naskiĝ-
jubileo.


La funebra ceremonio
okazis la 2an de majo
1974.

König estis Membro de
UEA, IFEF kaj GEA. Dum
multaj jaroj ĝis al sia
emeritiĝo en la jaro '70
li estis distrikt-komisiito
por Esperanto. ĉe la
BSW Regensburg.

Richard König establis
la Esperantogrupon Wei-
den en la jaro 1955 kaj
prezidis ĝin ĝis sia morto.
Ekipita per nobla karak-
tero kaj superstaraj ka-
pablecoj li disponigis
siajn energiajn fortojn
kun entuziasmo al la
Esperantismo.

Per ofta vizito de Espe-
rantokongresoj kaj aliaj
aranĝoj li gajnis multajn
geamikojn en la tuta
mondo. Li estis ĉiam

gaja, afabla kaj helpema
al ni. Pro tio ni funebras
pri li. Li restos ĉiam en
bona memoro.



Richard König +

Post mallonga grava
malsano mortis en Re-
gensburg Anni Kappl,
sesdekjara, la 21an de
Aprilo 1974. Sinjorino
Kappl laboris kiel tele-
fonistino ĝis 1966 ĉe la
fervojo.

Dum la dua mondmilito
ŝi perdis sian edzon
kaj restis ek de tiu
tempo vidvino.

Antaŭ dek jaroj ŝi ko-
mencis lerni la Internac-
ian Lingvon.

De tiam ŝi partoprenis
regule la naciajn kaj
internaciajn fervojistajn
kongresojn.

Per sia afableco kaj
amindeco ŝi gajnis mul-
tajn geamikojn en la
mondo.

Per la morto de nia
membrino Kappl perdis
la fervojista Esperanto-
klubo de Regensburg
fidelan membron.

Ni ne forgesos ŝin.
Ripozu en paco!

Kiel ni nur nun hazarde
eksciis, forlasis nin jam
la 23.7.1973 nia kolego
el Herford

Ernst Meirich,
nask. 27. 4. 1908

Li estis longtempe mem-
bro de la grupo Bielefeld.
Ni konservu al li bonan
memoron.

GEFA-estraro

Poŝtkarto, skribita de D-ro Zamenhof, trovita.

Okazis iom da tempo post
nia jarkunveno 1973, ke su-
bite venis letero de tute
nekonata sinjoro el Ko-
blenz. Li sciigis, ke li pose-
das poŝtkarton el la jaro
1895, skribitan kaj subskri-
bitan de le kreinto de la
lingvo Esperanto, D-ro Za-
menhof. S-ro Hentschel, kiel

li nomiĝas, deklaris sin pre-
ta, transdoni la karton al ni.
Prave s-ro Hentschel, kiu
mem ne estas esperantisto,
ekkonis la valoron de la
karto por la esperantistoj
kaj tuj pretis fordoni ĝin.
Intertempe aperis artikolo
pri la karto ligita kun histo-
riaj rimarkigoj pri la aŭtoro
de Esperanto en taga ga-
zeto en Herzberg (Harz),

kiun skribis la prezidanto
de GEFA.

Fotografaĵojn de la karto
ni intertempe sendis al di-
versaj interesuloj, ekz.UEA,
Heroldo, germana Esperanto-
biblioteko k.a. La originalon
ni donacis al la Internacia
Esperanto-Muzeo en Vieno.
Unu el la fotografaĵojn ri-
cevis la Hispana Esperanto-
Muzeo en Sant Pau d'Ordal,

kie okazis inaŭgura ceremonio de novaj ekspoziciejoj dum la 26a IFEF-kongreso.

Nikore dankas al s-ro Hentschel, kiu per sia modela agado helpis konservi valoran memoraĵon pri la aŭtoro de Esperanto kaj tiel kontribuis al pliriĉiĝo de la biografaj faktoj pri D-ro Zamenhof.

Estraro

Antaŭ 20 jaroj skribis la iama Bulteno-redaktoro A. Simon, Kaiserslautern:

„Laŭ multaj leteroj el la vico de la legataro la enhavo de nia Bulteno tre plaĉas kaŭze de la fakto, ke la plej multaj artikoloj prezentas tradukojn el fakaj fervojaj gazetoj. La nombro de la aktivaj kunlaborantoj ne estas sufiĉe granda. Ankaŭ la raporto el la grupoj ne kontentigis la legantojn. Per nia Bulteno ni volas esti precize informataj pri la vivo en la diversaj grupoj de GEFA, por ke la unuaj instigu la aliajn.

Denove ni alvokas ĉiujn aktivulojn: Helpu per artikoloj kaj raporto, por ke nia Bulteno estiĝos la necesa interkontaktilo celante la disvastigon de Esperanto inter niaj fervojistaj fakkoligoj.“

Resumo: La samajn zorgojn havas ankaŭ via ĝisnuna redaktoro

Mitteilung des Vorstandes
Vorstand, Bezirksbeauftragte und Beauftragte für Sonderaufgaben trafen sich am 23. März 1974 zu einer Arbeitssitzung in Frankfurt/M. Letzte Vorbesprechungen zu dem inzwischen durchgeführten 26. IFEF-Kongreß in Tarragona und die für Oktober geplante Jahresversammlung in Bamberg wurden getroffen. Für 1975 hat der Bezirk München nach Garmisch-Partenkirchen eingeladen. GEFA wird sich beim UK in Hamburg durch

eine fachbezogene Tagesveranstaltung und Mitarbeit im DB-Stand beteiligen. Am Nachkongreß in Kronach und beim Jugendtreffen in Münster/Westfalen werden unsere Mitglieder vertreten sein.

Werbung neuer Mitglieder, Information und Öffnung nach außen waren Themen, die lebhaft diskutiert wurden. Bulteno 3/74 ist inzwischen mit erhöhter Auflagenziffer u. a. an die Vorstände der BSW-Bezirke zur Information der Vertreterversammlung verteilt worden. Die im Jahre 1973 durchgeführten Pensionärstreffen haben bei den Beteiligten großen Anklang gefunden. Eine Wiederholung dieser Betreuungsmaßnahme ist beabsichtigt.

El la grupoj

Frankfurt (M)

Der Herr Bundespräsident hat unserem Mitglied Otto-Friedrich Denk das Verdienstkreuz am Band des Verdienstordens der Bundesrepublik Deutschland verliehen. Damit wurden seine langjährigen Verdienste im kulturellen und sozialen Bereich — besonders in seiner Vaterstadt Offenbach — anerkannt. Herzlichen Glückwunsch zur hohen Auszeichnung und alles Gute für die Zukunft.

GEFA-Vorstand

Münster/Vestfalo

Ankaŭ ĉi-jare esperantisto el Münster kaj Osnabrück faris la 1an de Majo sian ekskurson. Ni renkontiĝis ĉe la stacidomo Brock-Ostbevern. De tie la vojo kondukis nin tra tipa pejzaĝo de la Münster-regiono. Ni migris tra verdiĝantaj kampoj kaj arbaroj, preter baroka akvokastelo kaj belaj kamparanaj domoj kun imponaj altaj kverkoj.

Post pli ol 20 kilometroj

la migrontoj kun gajaj kantoj kaj muziko ni atingis la malnovan pilgriman urbeton Telgte.

Entute estis bela tago. Kompare kun la pasinta jaro la suno estis eĉ favora al ni.

En universitatoj kaj alt-lernejoj

Münster. Nuntempe en la lingvo-laboratorio de Overberg-Kolleg en Münster okazas Esperanto-kurso, kiu preparis Rudolf Fischer kunlabore kun la katolika kleriga institucio. La kurson partoprenas regule 10 personoj. Unu el la celoj de kurso estas pliarĝigi la lokan bazon por la 30^a junulara kongreso de TEJO, kiu okazos en 1974 en Münster.

Stuttgart: La 27an de Aprilo 1974 la distriktmembroj jarkunvenis en Stuttgart. Partoprenis 28 kolegoj, inter ili ankaŭ la iama distriktkomisiito Egon Kiefer, kiu nun loĝas en Frankfurt/M. Komune ni vizitis la lingvo-laboratorion de la Max-Eyth-lernejo kaj estis informataj pri uzado kaj valoro de tiu instalaĵo. Dum la demonstracio ni uzis diskon el „Esperanto programita“ de H. Behrmann. Poste ni renkontiĝis en apuda ĉambro de hotelo Herzog Christoph kaj aŭskultis bonegan prelegon respektive raporton de sinjoro A. Schwarz el Heilbronn pri lia dumvivaj spertoj kun Esperanto. Kiel juna viro li faris kelkajn migradarojn tra eŭropaj landoj, memkompreneble kun uzado de la Internacia Lingvo. En Svedujo li sukcese okazigis Esperanto-kursojn laŭ la direkta metodo, ĉar li ja ne parolis la svedan lingvon. Ĉiukaze ni aŭdis pri riĉenhava esperanta vivo. Rimarkinda estis la partopreno de la instruisto B. Kinkel al nia jarkunveno. Ni povis entuziasmigi lin pri Esperanto.

Migrado en Svisa Alparo Sub aŭspicio de Svisa Esperanto-Junularo — 17a ĝis 22a de Julio 1974

En la esperantista medio ne mankas eblecoj kunsidi, forumi, debati, ĉirkaŭveturi kaj aŭdi radion. Sed mankas okazoj por ekzerci la krurojn, forigi la bonstatan grason kaj iĝi bele bruna kaj sana. Pro tio SEJ organizas migradon en Svisa Alparo. Tiu internacia ekskursado okazos ĉe Gothardo-Montaro. La marŝado daŭros de 4 ĝis 8 horoj tage, kaj oni dormos en diversaj kabanoj laŭlonge de la vojo. La partoprenkotizo, inkludanta kolektivian bileton ek de Zürich, komunajn manĝojn kaj trinkaĵojn same kiel la loĝadon, estos inter 150. — kaj 200. — frankoj svisaj (laŭ la aĝo) por la tuta restado. — Krokodilado ne tolerata. — Se vi deziras havi pliajn informojn aŭ ricevi pleningendan aliĝilon, skribu al:

Somera Migrado / Daniel R. Mühlemann / Museumstr. 19 / CH-5200 BRUGG.

Kolektado de Esperantaĵoj

Amika Rondo de Esperantoj Kolektantoj (AREK), S-ro Gaston Trèmon, 31, strato Turgot, F-87350 Panazol (Francujo) intencas daŭrigi la laboron de S-ro Jensen el Aarhus. La „Katalogo Jensen“ estas la plej riĉa kaj unika en la mondo, oni trovas en ĝi materialon ĝis la jaro 1971. La lasta glumarko havas la numeron 773.

Sed S-ro Trèmon ne povas fari la laboron sola, li bezonas helpon de ĉiu unuopa Esperantisto. Li petas sendi al li specimenojn aŭ informojn de noveldonitaj glumarkoj: okazo, urbo, lando, dato, formato, konturoj, kanto ktp. Kompreneble ankaŭ nekonataj glumarkoj antaŭ la jaro 1972 estas bonvenaj.

DB-novajoj

La Federacia Fervojo transportas ĉiujare 1,6 miliardojn da pasaĝeroj kaj 350 miliardojn da vartunoj. Per tiuj trafikservoj la Federacia Fervojo atingis sur multaj fervoĉeflinioj la limon de sia kapableco, sur la fervojlinioj de nord-suda direkto eĉ parte transpasis ĝin.

Ekzemple: Sur ambaŭ Rejno-fervojlinoj veturis dum unu tago 651 trajnoj. Tiom multe da trajnoj ne povas akurate veturi, ĉar la limo porsenĝena funkciado estas tie ĉ. 500 trajnoj ĉiutage. La kurboj estas tro malvastaj, altaj rapidecoj ne estas eblaj.

Ĝis la jaro 1985 la Germana Federacia Fervojo atendas en la pasaĝertrafiko pluson de 100 % kaj en la vartrafiko pluson de 50 %. Tio nur estos ebla per modernaj trakoj, per novkonstruo de fervojlinioj kaj renovigo de ekzistantaj relvojoj.

La Federacio kaj la Landoj konstruis ek de 1950 ĉ. 40 000 km da novaj ŝoseoj. El tiuj estas pli ol 3100 km aŭtostratoj. Ĝis 1985 la Federacio intencas urĝe konstrui pliajn 11 500 km da granddistancaj ŝoseoj. La konstrukostoj por tio laŭ la preznivelo de 1972 estas kalkulitaj je 73 miliardoj da germanaj markoj.

Ankaŭ la Germana Federacia Fervojo devos konstrui modernajn kaj rapidajn fervojliniojn. 4 tutnovaj fervojlinioj estos en funkcio ĝis 1985. Al la unua etapo kun longeco de entute 630 km kaj investbezono de 11,2 miliardoj germanaj markoj apartenas la novkonstruataj fervojlinioj.

Hannover — Gemünden,
Köln — Groß Geraü,
Mannheim — Stuttgart
kaj Aschaffenburg —
Würzburg.

Samtempe 1200 km da ekzistantaj fervojlinioj estos plimodernigitaj por rapideco ĝis 200 km po horo. Por tio necesas 2,6 miliardoj da germanaj markoj.

Granda gajno je vojaĝtempo rezultiĝos el pli mallongaj distancoj, pli altaj rapidecoj kaj malmultaj haltoj. Tiel ekestos inter pli multaj urboj bonaj trafikkomuniko, kaj per tio la pasaĝeroj disponos pri pli multe da tempo en sia vojaĝcelo.

Heimlich jr.

Esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj en 1974

6-13. VII. Lago Päijänne, Finnlando: Esperantotendaro „Parolu kaj aŭskultu (E-klubo, SF-17 300 Vääkky)

6-18. VII. Koronovo, Pollando: Internacia Jurnularaj Esperanto-Ferioj (Juventur, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz)

7-13. VII. Gyula, Hungarujo: 12a Somera Esperanto-Universitato (SEU, TIT, 48as u. 11, H-5700 Gyula)

7-21. VII. Dudince, Ĉeĥoslovakio: Somera Esperanto-Lernejo (E.Vana, CS-96271 Dudince, okr. Zvolen)

8-13. VII. Tisvildeje, Danlando: Junulara Seminario pri edukado (A. Skovrind, Ved Kaeret 6, Sengelose, DK-2630 Tastrup)

10-20. VII. Sikonda, Hungarujo: 7-a Pionira Esperanto-Tendumado por 10-15-jaruloj (HEA, Pf.2, H-7601 Pécs)
Aŭgusto; Bacedaso, Italujo: Someraj Klerigaj Semajnoj de „La Patrolo“ (Via Pantano 17/1, 20122 Milano)

3-7. VIII. Westerland sur la insulo Sylt, FRG: 3-a Ornitologia. Semajn-duono de ORE (B. Fischer, Am Friedrichsain 4, D-2280 Westerland 44)

3-9. VIII. Bergamo, Italujo: 47-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT (Via Statuto 21, I-24100 Bergamo)

4-10. VIII. Kronach, FRG: Oficiala Postkongreso (Fremdenverkehrsamt, Esperanto, Pf. 510 D-8640-Kronach)

4-10. VIII. Münster, FRG: 30-a Internacia Junulara Konferenco de TEJO (Gisela Jungkamp, Mondstr. 3, D-44 Münster)

4-11. VIII. Krommenie, Nederlando: 20-a Internacia Feriosemajno (S-ino V. de Meulen, Popelstr. 13, Krommenie)

4-14. VIII. Szeged, Hungarujo: Internacia Turista Esperanto-Renkontiĝo (Idegenforgalmi Hivatal, Klauzál ter 7, H-6701 Szeged)

4-25. VIII. Liège, Belgujo, Someraj Universitataj Kursoj (SUK, B. p. 9, B-4000-Liège 3)

200.000 lernolibroj kaj vortaroj en Hungarujo

En enkonduka artikolo en n-ro 3 (1973) de Hungara Fervojista Mondo, D-ro I. Bácskai raportas, ke en la postmilitaj jaroj aperis en Hungarujo pli ol 200.000 ekzempleroj de Esperantaj lernolibroj kaj vortaroj.

La aŭtoro citas la lernolibron de Julio Baghy (81.000 ekzempleroj), la I-an kaj II-an volumojn de la lernolibro de D-ro I. Szerdahelyi (70.000 ekzempleroj), la Esperantan-Hungaran kaj Hungaran-Esperantan Vortaron (po 30 mil) de Alfonz Pechan, la sisteman Esperanto-gramatikon (hungare) de D-ro K. Kalocsay, la konversacian libron pri Esperanto (hungare) de D-roj J. Mátéffy kaj I. Nagy (15.000 ekz.).

En Hungarujo krome aperas kaj estas vendata en kioskoj la 32-paĝa „Esperanto-

Magazino — lingvo kaj mondo“ en hungara lingvo: eldonkvanto 10.000 ekzempleroj.

La Esperanto-jarlibro de Hungara Esperanto-Asocio estas eldonita en 20.000 ekzempleroj.

Komunikaj problemoj de gastlaboristoj

Sub la ĝenerala temo „Komunikaj problemoj de eksterlandaj laboristoj kun speciala konsidero de iliaj infanoj en la lernejoj“ okazos de la 17-a ĝis la 26-a de Julio la ILEI-konferenco en Sonnenberg, FR Germanujo. La kotizo, kiu inkluzivas ĉion, estas 225 gmk. Informas: H. Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen. (Pilo)

La „Tezoj“ de D-ro Frank
La famaj „Tezoj por la germana lingvopolitiko“ de Prof. D-ro Helmar Frank, Universitato Paderborn, FRG estas presitaj en la februara numero de la konata scienca revuo „ibw-Journal“ de Deutsches Institut für Bildung und Wissen en Paderborn. Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj klopodas nun, ke tiu epokfara studo pri la lingvoproblemo aperu ankaŭ en aliaj landoj en fakaj revuoj.

Esperanto-traduko estas disponebla jam. Esperantistoj, kiuj volas kunagi, bv. mendi ambaŭ versiojn de la „tezoj“ ĉe Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1, „Simplaj“ intereso-rlupj pri la „tezoj“ aldonu 4 rkp.

Nova kurso-sistemo

La Belga Esperantista Fervojista Asocio (BEFA) adoptis originalan sistemon por sia koresponda kurso.

Ĉiu kursano pagas 350 b. frankojn: 100 fr. estas destinitaj al aŭtomata aliĝo al BEFA. La kurso-kotizo, 250 fr., estos repagita al la lernanto, se li finos la kurson en la daŭro de unu jaro kaj partoprenos en almenaŭ kvin kunvenoj organizitaj de BEFA aŭ kunlabore kun ĝi. Se la lernanto finas la kurson en ses monatoj, li krome ricevas vortaron senpage.

En Valladolid hispanoj. La 36-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Valladolid, de la 18-a ĝis la 22-a de Julio. Inf. Dos de Mayo 4, Valladolid.

Itala kongreso en Verona. La 45-a Itala Esperanto-Kongreso okazos de la 14-a ĝis la 19-a de Septembro en Verono, kun la ĝenerala temo „Eduko valoro de Esperanto por formado de internacia konscio“. (R.R.)

Francaj katolikoj. La jar-kongreso de Francaj Katolikaj Esperantistoj okazis la 11-an kan 12-an de Majo en Angers.

Usona kongreso. De la 21-a ĝis la 23-a de Junio okazis en Spokane (ŝtato Vaŝingtono) la 22-a Kongreso de ELNA.

„Verda Stelo“ en televido. Fine de Januaro la televido en Birmingham (Britujo) dissendis kvin-minutan elsendon dediĉitan al la trin-kejo „Verda Stelo“ en Stoke-on-Trent. La programo komenciĝis per konversacio de esperantistoj sidantaj ĉirkaŭ la tablo.

Redaktfino por n-ro 5/74 estas la 1. 8. 1974.
